


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, internacia lingvo



La prezidantino de IFEF festparolas dum la inaŭguro de la 64-a IFEF-kongreso en Herzberg am Harz

2

2012

56-a jarkolekto



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervoĵista Esperanto-Movado
en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt
Rákos u. 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 1500
al eksterlanda adreso: EUR 10

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős:

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület
Misztótfalusi Nyomdaipari Kft.

Felelős vezető: Soósné Pálfalvai Adrienn

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO

- 2-a kovrilpaĝo: **I. Gulyás:** Pri la kongresoj
17. **I. Gulyás:** IFEF kongresis en la „Esperanto - urbo”
22. **J. Patay:** Fakaj informoj
24. **I. Pethes:** Post la 14-a IFEF-kongreso (Dua parto)
27. **Red.:** Alta honorigo de Gábor Pál
28. **I. Gulyás:** Estrarkunsido de IFEF en Francio
31. **J. Patay:** Zoltán Kodály
3-a kovrilpaĝo: **J. Komáromi:** Malsupren sur la deklivo

PRI LA KONGRESOJ

Finiĝis la 64-a IFEF-kongreso, la kongresa programo estis elĉerpita. La kongresanoj vere ĝuis la kongresajn eventojn, la ekskursojn al la belega regiono de Harz-montaro, la variajn kulturajn kaj distrajn programojn, eĉ ankaŭ la kunsidojn kaj fakprelegojn. La vetero estis belega dum la tuta semajno, la cirkonstancoj estis ĝustaj, do preskaŭ ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj. Dank’ al la helpopretaj LKK-anoj kaj helpantoj, al la urbestro kaj vicurbestro, al la kunlaborantoj de la Interkultura Centro Herzberg. Ĉiuj rajtas esti fieraj pro tiu kongreso.

Ni ĉiuj ege atendas la sekvan kongreson de IFEF, okazonta en Francio en 2013, kaj ni esperas, ke ankaŭ tiu kongreso rikoltos grandan sukceson.

Kio okazos en 2014? Antaŭ kelkaj jaroj ankoraŭ konkuris la landaj asocioj por gajni la rajton organizi IFEF-kongreson. Por 2014 bedaŭrinde neniu landa asocio kuraĝas entrepreni la organizadon de kongreso. Tio estas malĝoja afero. Tamen mi esperas, ke finfine estos entreprenema landa asocio por 2014.

Estas ĝojplena evento, ke la Ĉina Fervoĵista Esperanto-Asocio informis nin dum la lasta IFK, ke en la jaro 2015 ili volonte organizus IFEF-kongreson en Ĉinio. Tiu anonco estas granda sukceso por IFEF, sed mi devas rimarki, ke Ĉinio estas fora lando, kaj ne tro multaj eŭropanoj povos partopreni tiun.

Alia temo estas la UEA-kongresoj. Se ni analizis la UEA-kongresojn, ni povas konstati, ke UEA en 2010 en Kubo, en 2012 en Vjetnamio, en 2013 en Izlando kaj en 2014 en Argentino organizas kongreson, kaj la membroj de la partoprenantoj kontinue malaltiĝas. Mi tute ne komprenas la respondeculojn de la UEA-kongresoj, kial oni organizas kongresojn unu post alia ekster Eŭropo en foraj landoj.

István Gulyás

IFEF KONGRESIS EN LA „ESPERANTO-URBO”

Jam la sesan fojon gastigis la landa asocio de IFEF en Germanio la fervojistajn esperantistojn por kongresi. Post Lindau (1952), Fulda (1967), Regensburg (1981), Münster (1992) kaj Dresden (2003) sekvis en la vico la ĉarma, idila urbo Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, kie okazis la 64-a IFEF-kongreso inter la 19-a kaj la 25-a de majo 2012. Al la kongreso aliĝis entute 160 esperantistoj el 21 landoj.

La historio de la kongreslando Germanio estas tiel varia kaj longa, ke en la kadro de tiu ĉi raporto mi ne povas denombri ankoraŭ nur la plej gravajn historiajn eventojn. Tamen mi povas menciigi kelkajn gravajn okazintaĵojn el la historio de Germanio, kion mi lernis en la mezlernejo, kaj legis en interesaj historiaj libroj.

Jam en la VIII-a jarcento a. Kr. oni parolas pri germanaj gentoj, kiuj dum la jarcentoj establis federaciojn por krei memstarajn ŝtatojn. La plej gravaj popolgrupoj estis la gotoj kaj la alemanoj. La vivo de la prauloj de la germanoj estis kontinuaj militoj unu kontraŭ aliaj, kontraŭ la romianoj, hunoj, avaroj, saksoj ktp. Poste estiĝis la franka imperio, kiu dum la regado fortoplene disvolviĝis. La plej grava reganto estis Karolo la Granda, kiu solidigis la frankan imperion, kaj unuigis la diversajn gentojn. En tiu teritorio estiĝis la posta Germanio. Multaj reĝoj, princoj eĉ imperiestroj sekvis unu la alian dum la jarcentoj, kaj en la XV-a jarcento post Kristo Germanio jam atingis ekonomie altan evoluantan nivelon. Poste okazis multaj revolucioj, eĉ la tridekjara milito inter la katolikoj kaj protestantoj. Germanio estis dispecigita, tamen la germana ekonomio malrapide evoluigis.

La vera ekprospero komenciĝis sub la regado de la Habsburgoj. La agrikulturo, industrio evoluis, la barokaj konstruadoj kaj la belarto prosperis. Oni establis la doganligon, kaj naskiĝis la germana fervojo. En la jaro 1835 oni ekfunkciigis la unuan fervojlinion inter Nürnberg kaj Fürth. Formiĝis la Germana Imperio, kiel federacia ŝtato. Sekvis malfacilaj tempoj, du malvenkitaj mondmilitoj, poste Germanio dividiĝis je du partoj, kaj nur post preskaŭ 50 jaroj unuigis la lando. Ekde tiam Germanio evoluis kun nekredeble rapideco kaj dinamiko.

En la mezo de tiu historiica lando troviĝas la montaro Harz, kaj sur la sunaj deklivoj de tiu etendiĝis nia kongresurbo Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. En la Malsupra Saksio ĝis la falo de la „fera kurteno” tiu ĉi belega turisma regiono estis dividita je du partoj: Federacia Respubliko Germanio kaj Germana Demokrata Respubliko. Intertempe ĝi fariĝis komuna regiono kaj



Aŭstraj gekolegoj dum la inaŭguro

plenplenas je diversitaj turismaj allogaĵoj. Goethe, Heine eĉ la dana fabelpoeto Andersen eltrovis kaj laŭdis tiun regionon, kaj ili skribis verkaĵojn pri „la plej bela kaj plej variaspekta regiono en Eŭropo”. Dum la tuttaga kaj la duontagaj ekskursoj ankaŭ ni spertis la verecon de tiu konstato. En la montaro troveblas la „Nacia Parko Harz” kun vastaj arbaroj, profundaj lagetoj, krutaj valoj kaj multaj riveretoj. Kiam mi veturis per trajno preter la deklivo de la montaro mi vidis karstan pejzaĝon kun montetoj, rokoj, kavernoj, pitoreskaj vilaĝoj kaj agrablaj feriolokoj.

Herzberg am Harz laŭ la decido de la urba konsilantaro de julio 2006 uzas la oficialan kromnomon „Esperanto-urbo”. La urbo estas vizitinda ne nur pro la klerigaj aranĝoj de la Interkultura Centro Herzberg, sed ankaŭ pro la bela pejzaĝo kaj la interesa historio. En la urbo



Ĉinoj dum la inaŭguro



Flagoparado en la ĉefplaco

troveblas multnombraj trankvilaj anguloj kun malnovaj sed tamen bonstataj kaj belaspektaj faktrabasadaj domoj, puraj kaj florriĉaj stratoj, la nova kaj malnova urbodomo, sur la monteto la pli ol 900-jara Kastelo de Welf-familio kun muzeo, la granda Jues-lago kun flegataj gazonoj, centjaraj arboj, multaj akvobirdoj kaj subĉiela naĝejo ktp. Kiam mi frumatene trairis la urbon, mi vidis multajn, ĉefe maljunajn homojn, kiuj flegis la ĝardenojn, balais la trotuarojn, do pro tio estas ĉie pureco kaj prizorgitaj ĝardenoj. Vespere, kiam mi iris al mia hotelo el la kongresejo, mi vidis dumvoje neniun krom mi sur la stratoj, eĉ nek en la ĉefplaco, do pro tio mi parolas pri multaj trankvilaj anguloj. Dise en la urbo troveblas multaj Esperanto-objektoj, konstruaĵoj kaj informtabuloj, inter ili la Giessner-monumento antaŭ la stacidomo, la Zamenhof-monumento ĉe la plej frekventata loko de la urbo, dulingvaj ŝildoj kaj informtabuloj, kelkaj restoracioj kun esperantlingva menukarto k.a. La plej grava konstruaĵo en la urbo por la esperantisto estas la „Interkultura Centro Herzberg”. Ĝi havas diversajn funkciojn, kiel sidejo de la regiona E-Societo Sudharco, filio por klerigado kaj kulturo de Germana E-Asocio, sidejo de la Asocio de

Germanaj E-Institutoj, la landa sekcio de ILEI, kursejo kaj ekzamenejo. La Centro plenumas ankaŭ la rolon de organiza kaj informa centro pri Esperanto en la urbo Herzberg am Harz.

La vetero estis dum la tuta kongressemajno sunbrila kaj varma. La estraranoj kaj la LKK-anoj havis eblecon trairi kaj promeni en la urbo, ja ni loĝis en la hotelo „Jagerhof”, kiu situas pr. du kilometrojn de la kongresejo. Dank’ al Dio, ke LKK certigis por ni aŭtobuseton, per kiu ni povis multfoje rapide trafiki inter la hotelo kaj la kongresejo.

Sabate la unua programero de la kongreso estis komuna *Kunsido inter la IFEF-estraro kaj LKK*, en kies kadro ni traktis kelkajn organizajn temojn.

Samtempe okazis la unua parto de la *Lingvoseminario* gvidata de la prezidanto de ILEI, Stefan MacGill. En la seminario partoprenis dek interesuloj el Brazilo, Slovakio, Rumanio, Ganao, Germanio kaj Hispanio.

Vespere okazis la *Interkona vespero* en la kongresejo, kiam la ĉestantoj salutis unu la alian, kaj babiladis pri la okazintaj eventoj depost la pasinta IFEF-kongreso. Ni tre ĝojis, ĉar venis esperantistoj el Ĉinio, Brazilo kaj Ganao por partopreni la kongreson. Ĉar la kongresejo estis en la restoracio „Artemis”, dum la vespero ni trinkis bongustajn bierojn, kaj la tempo rapide forflugis.

Dimanĉe antaŭtagmeze okazis la *Solena inaŭguro* de la kongreso en la impona halo de la Nicolaj lernejo. Komence gimnazianoj lernantaj Esperanton deklamis la poemon „La vojo”. Poste la kongreson salutis la reprezentantino de BSW s-ino Margarete Zavoral, kiu en sia parolado skizis la nunan situacion de BSW, kaj substrekis la valoron de Esperanto. La urbestro s-ro Gerhard Walter sian germanlingvan paroladon tuj li mem tradukis esperantlingven. Li akcentis la gravecon de Esperanto en la vivo de la urbo Herzberg, emfazis la internacian agadon de la Interkultura Centro Herzberg, kaj taksis nian kongreson grandsignifan



Komuna fotado dum la inaŭguro



V. Tornillo, R. Bolognesi kaj E. Tudorache en fervojista uniformo

eventon. Stefan MacGill prezidanto de ILEI substrekis la gravecon de la komenciĝanta kunlaboro inter IFEF kaj ILEI.

Reprezentantoj de la landaj asocioj salutis la kongreson, inter ili István Sutka, kiu transdonis al la kongreso la bondezirojn de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Dum la inaŭguro okazis muziko fare de pianisto kaj ĉelisto, kaj belaj kantoj de la fervojista virkoruso el Hannover.

Fine la prezidantino de IFEF Rodica Todor faris festparolon. La prezidantino en sia festparolo laŭdis la LKK-anojn pro la bonega elekto de la kongresurbo, ĉar Herzberg estas la unua urbo, kies oficiala nomo enhavas la vorton Esperanto. Ŝi rememoris pri Joachim Giessner, kiu loĝis, laboris, verkis kaj instruis Esperanton en ĉi tiu urbo, kiu estis la plej longdaŭra prezidanto kaj poste honora prezidanto de IFEF. La prezidantino transdonis Honoran Diplomon al la LKK-prezidanto Achim Meinel pro la organiza laboro, al la urbestro de Herzberg Gerhard Walter pro la invito por kongresi en la Esperanto-urbo kaj pro la helpo de la organiza laboro, al Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar pro la sindona agado kaj fervora varbado por la 64-a IFEF-kongreso. La prezidantino en sia festparolo metis la demandojn: „Ĉu spite al mondaj krizoj, spite al malkresko de la membraro, IFEF survivos? Ĉu spite al kongresoj pli kaj pli malmultnombraj, plu okazos IFEF-kongresoj? Ĉu spite al maljuniĝo de nia Federacio, ni havos dum longa tempo komunan estontecon?” Ŝi respondis: „Por nova estrar-teamo, kiu konfrontiĝas kun tiuj demandoj, la respondo ne estas facila. Al tiaj provokoj ĝi devas serĉi kaj trovi taŭgajn solvojn. Pro tio inter du kongresoj ni laboras por konkretigi tiujn solvojn tiel, ke nun ni povu antaŭ vi prezenti kuraĝigan situacion. Dum la pasinta jaro okazis oftaj kontaktoj de la IFEF-estraro kun diversaj organizoj kaj instancoj el pluraj landoj tiel, ke ni povas raporti hodiaŭ al vi, ke:

- estas ankoraŭ landaj asocioj, kiuj intencas inviti la estontajn IFEF-kongresojn;
- kelkaj Esperanto-Asocioj proponas komunajn

kongresojn kun IFEF;

— pluraj Esperanto-Organizoj pretas plifortigi la kunlaboron kun nia Federacio, renovigante la oficialajn interkonsentojn.

La plej ĝojiga informo estas, ke sekve al tiuj kontaktoj, nova Landa Fervojista Asocio starigis en Kubo, kaj pretas aliĝi al IFEF. Pro tio mi restas optimisma pri la sekvontaj jaroj! Mi forte esperas, ke nia teamo sukcesos – pere de via helpo – direktigi antaŭen nian Federacion”. Per tiuj vortoj ŝi malfermis la 64-an IFEF-kongreson.

Post la inaŭguro en sunbrila vetero okazis *Komuna fotado* kun internacia fervojista uniformparado. Preskaŭ ĉiuj landaj asocioj prezentis fervojan uniformon, kaj la Interkultura Centro disdonis flagojn de la partoprenantaj landoj, kaj multajn Esperanto-flagojn. Venis blovorkesto kaj sekvis *Parada marŝo* tra la malnova urboparto ĝis la ĉefplaco. Policistoj helpis la marŝon, kaj certigis la vojon. En la ĉefplaco la urbestro parolis pri la graveco de la Esperanto-movado ne nur por ni, sed por la urbaj civitanoj. De la ĉefplaco la marŝo daŭrigis ĝis la kongresejo gvidante de la blovorkesto. Multaj urbaj loĝantoj rigardis kaj aplaudis la marŝon. Bonega ideo kaj belega travivaĵo estis tiu ĉi evento por ĉiuj partoprenantoj.

Posttagmeze okazis la dua parto de la *Lingvo-seminario*.

Samtempe la urbestro s-ro Walter *inaŭguris* antaŭ la stacidomo la *Esperanto-placon* kaj la *Joachim Giessner-Vojon*. En la inaŭguro vigligis nin la blovorkesto el Silber.

Poste okazis la *Ekumena Diservo* en la romkatolika preĝejo Sankta Jozefo. La diservon gvidis pastro Bernhard Eichkorn kaj Siegfried Krüger. Malgraŭ la okazaĵplena tago la preĝejo estis preskaŭ plenplena. Estis legita liturgiaj tekstoj el „La agoj de la Apostoloj”, kiun sekvis sankta orgen-muziko kaj komuna kantado. Poste okazis prediko kun pensoj pri Pentekosto. Je la fino ni komune preĝis la preĝon „Patro nia”. La tuta diservo okazis esperantlingve.



Dum la festa vespermanĝo



Belega strato en Göttingen

Dimanĉe vespere okazis *Harztipa folkloro*. La folkloro grupo „Harz-Klub Phölde” per ĉarmaj kantoj kaj vervaj dancoj faris belan spektaklon, kaj la ĉeestantoj ĝuis la interesan prezentadon.

Lunde matene la invititaj kongresanoj kunvenis en la korto de la Kastelo Welf, kie la partoprenantoj povis admiri la belegan kastelan konstruaĵon kaj la ĉarme ornamitan turon. En la Kavalira Salono okazis bonveniga *Akcepto de la vicurbestro* s-ro Ullrich Schramke. La vicurbestro kun varmaj vortoj salutis la ĉeestantojn. La honora prezidanto de IFEF s-ro Romano Bolognesi respondis, kaj substrekis la dankadon de la kongresanoj pro la urba subteno de Esperanto. La prezidantino de IFEF s-ino Rodica Todor transdonis IFEF-blazonon al la vicurbestro, eĉ al la Interkultura Centro Herzberg.

Tuj post la akcepto komenciĝis la *Nepublika Komitatkunsido* en la Kavalira Salono. Ĉiuj invititaj komitatanoj, observantoj kaj honoraj membroj partoprenis. La komitato longe diskutis la kongresproponon, la elekton de la ĉefkomitatano kaj anstataŭanto, la kasraporton 2011 kaj la buĝeton por la jaro 2013, la situacion en kelkaj landoj, la venontajn kongresojn kaj eksterajn rilatojn. Dum la paŭzo de la kunsido okazis *Gazetara akcepto* kaj komuna fotado, kiu aperis en la sekvontaga urba ĵurnalo.

Posttagmeze estis daŭrigata la tria parto de la *Lingvo-seminario*.

Samtempe okazis la *Kunsido de la Faka Komisiono*. La ĉefa punkto de la programo estis la elekto de la komisionaj funkciuloj. Sekvis reelektio

de la gvidanto de la Faka Komisiono (Jan Niemann), kaj de la du sekretarioj (Heinz Hoffmann por la Terminara Sekcio, kaj Ladislav Kovař por la Fake-aplika Sekcio). La kunveno daŭriĝis per raportoj pri agado de ambaŭ sekcioj dum la lasta periodo, kaj poste okazis diskutado pri fakaj fervojaj terminoj. La kunsido traktis 16 fervojfakajn nociojn, kaj por ĉiuj nocioj estis deciditaj taŭgaj terminoj.


Vespere okazis la *Internacia balo* kun bona manĝaĵo kaj ĝuplena muziko. La partoprenantoj gaje dancis ĝis noktomezo, ĉar la orkestro „Silverbirds” dancis nin je agrablaj melodioj.

Marde antaŭtagmeze multaj kongresanoj kolektiĝis en la kongresejo, por ke ili partoprenu en la publika *Plenkunsido*. Multaj tagordpunktoj estis traktitaj. Ni honoris niajn mortintojn, kaj aŭdis la salutojn de SAT, Esperanto-redakcio de Radio Havano, Vatikana kaj Pollando, kaj de János Patay kaj József Cziboly. La komitatanoj aprobis la estrarajn raportojn, la protokolon de Liberec, la raporton de la ĉefkomitatano, de la Faka Komisiono, de la komitatano „A” ĉe UEA, resumon de la landaj jarraportoj por la jaro 2011, kaj analizon en kelkaj landoj pri la nuna situacio. La komitato reelektis la ĉefkomitatanojn (Jindřich Tomíšek), kaj la anstataŭantojn (Florin Negrea el Rumanio) por la sekvaj tri jaroj. La komitatanoj akceptis la buĝeton por 2013, kaj konfirmis la 65-an IFEF-kongreson por la jaro 2013 en la franca urbo Artigues-pres-Bordeaux, kiu okazos de la 4-a ĝis la 12-a de majo. Por 2014 neniu lando estas preta organizi kongreson, sed por 2015 la ĉinaj fervojistaj esperantistoj pretas gastigi IFK-on. Longa diskutado estis pri la principo de la pagoj de la tranoktoj de la estraranoj, funkciuloj de la Faka Komisiono kaj la ĉefkomitatano pere de LKK de la IFEF-kongresoj. La komitato decidis trakti la temon denove dum la venontjara IFK.

Post la plenkunsido okazis *Duontaga ekskurso al Göttingen*. La partoprenantoj veturis per trajno al la urbo, kie ni rigardis kelkajn malnovajn preĝejojn kiel la „St. Johannes”, „St. Michael”, „St. Jakobi”,



En la etspura trajno dumvoje al Wernigerode



Baroka kastelo en Wernigerode

multajn faktrabfasadajn domojn kiel la 500-jaraĝa domo de Schröder, kaj ankaŭ 500-jaraĝa konstruaĵo de Abel Bornemann. Ni vizitis en la urbocentro la historian urbodomon, kie troviĝas granda prezentsalono kun blazonoj de multaj germanaj urboj, plurkoloraj kaj interesaj murpentraĵoj. Ni promenadis en kelkaj interesaj butikstratoj, en belege flegita parko, kaj ĝojigis niajn okulojn



La ĉefplaco de Goslar

multajn belaspektajn konstruaĵoj. Vespere la partoprenantoj ĝuis la interesan *Filmprezentadon*: „175 jaroj de Germanaj Fervojoj”.

Merkrede okazis la *Tuttaga ekskurso* al Nordhausen, kaj de tie per etŝpura trajno al *Wernigerode* tra la Harz-montaro. En la mezepokstila urbo ni havis sufiĉan tempon por promenadi, foti, eĉ veturi per strata trajneto al la

pitoreska baroka kastelo sur la montopinto. La urbo havas pli ol 30 mil enloĝantojn, kaj estas unu el la plej populara ripozloko de Germanio. La plej bela konstruaĵo de la urbo estas la gotstila urbodomo, kiu ekde la XVI-a jarcento funkcias kiel urbodomo. En la placo antaŭ la urbodomo staras la „merkatputo” el la jaro 1845, kaj la „Gotika domo” el la XV-a jarcento. Multegaj faktrabaj kaj barokartaj domoj troveblas en Wernigerode. La preĝejoj „St. Sylvestri”, „St. Johannis”, „Liebfrauen” kaj „Teobald”, la belega urba parko ankaŭ montras la riĉan pasintecon de la urbo. Post la kelkhora restado ni reveturis per speciala aŭtobuso tra la montaro al Herzberg. Vespere la hamburga kantisto *Ralph Glomp* kun helpo de moderna tekniko ĝojigis nin per konataj kanzonoj kaj kantoj.

Ĵaŭde antaŭtagmeze okazis la *Ĉefa fakprelego* kun titolo: „La baltmara tunelo. Nova interligo al Skandinavio”. La ege interesan temon kun lumbildoj prelegis Lene Niemann. Poste sekvis ok *Fervojfakaj aktualaĵoj*: Heinz Hoffmann: Sciindaĵoj pri Harcaj Etŝpuraj Fervojoj; Siegfried Krüger: Fervoja projekto Stuttgart 21; Lene Niemann: Metroo en Rijad; Jaroslav Matuška: Trafika salono de Universitato Pardubice; Ladislav Kovač: Nova silkvojo; Manfred Retzlaf: Rememoro je Joachim Giessner; Zlatko Hinst: Elstaraj kroataj esperantistoj; Pavlin Petrov Boevski: Novaĵoj de Bulgaraj Fervojoj. Posttagmeze okazis *Duontaga busekskurso* tra la Harzmontaro al la belega urbo *Goslar*. Dumvoje ni haltis ĉe „Torfhaus”, de kie ni povis admiri la plej altan monton de la Harz-montaro, la 1141 metrojn altan „Brocken”. Goslar estas mondkulturheredaĵo de Unesko. En la urbo sub gvidado de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy ni povis konatiĝi ne nur kun la historio de Goslar, sed ankaŭ kun ĝia varia arkitekturo. La mezepokaj domoj laŭ faktrabaj aspektoj, kaj la vere impona frua germana imperiestra palaco „Kaiserpfalz” elradiis apartan pitoreskan scenejon kaj mirigis la spektantojn. La partoprenantoj trapromenadis la kernon de la urbo, miris la konstruaĵojn, la purajn stratetojn, la belegan ĉefpreĝejon, la malnovan urbodomon, kaj ripozige trinkis kafon eĉ bieron. Mirinda urbo, belega vetero, komforta reveturado, do tiu ekskurso estis por mi la plej bela travivaĵo dum la 64-a IFK. Vespere la alia belvoĉa kantisto, la itala *Emanuele Rovere* ĝojigis nin per siaj enhavriĉaj kantoj.

Vendrede, en la lasta tago de la kongreso, prezentis sin la *Venonta kongreso*. La 65-a IFEF-kongreso okazos en Francio en la urbo Artigues-pres-Bordeaux inter la 4-a kaj 11-a de majo 2013. Per multaj lumbildoj kun klarigo prezentis nia vicprezidantino Sylviane Lafargue la vidindaĵojn de la urbo kaj la lokojn de la dumkongresaj ekskursoj. Ŝi konigis la invitilon kaj la aliĝilon, kaj iomete detale parolis pri la programo de la kongreso. Fine post la prezentado la organizantoj transdonis invitilojn kaj aliĝilojn al la responsuloj

de la landaj asocioj.

Post la prezentado la prezidantino de IFEF Rodica Todor, kaj la prezidanto de ILEI Stefan MacGill solene subskribis la „Kunlaboran Interkonsenton”. Poste okazis la kunsido de *Faka Komisiono*, kaj samtempe *Estrarkunsido* de IFEF. Dum la estrarkunsido la ĉefaj temoj estis la taksado de la herzberga kongreso, la aŭtuna estrarkunsido kaj la estrarelekto en la sekva IFEF-kongreso.

Poste sekvis la ĉiam atendata programero de la kongreso la *Movadaj aferoj*. La plej grava temo estis la estonto de IFEF. En la kadro de tiu temo ni parolis pri la sekva estrarelekto, pri la kongreso en 2014, pri la problemo de la faka laboro, pri la artikoloj por nia faka revuo „Internacia Fervojoisto”. La konkludon oni devos fari dum la aŭtuna estrarkunsido, por ke en la sekva IFK la komitato povu serioze trakti tiujn plej gravajn temojn de nia movado.

Dum la kongresa semajno aperis tri numeroj de la *Kongresa Bulteno* sub la nomo „Harca Balailo”. Tiuj estas belaspektaj kun multaj fotoj kaj interesaj artikoloj. Mi gratulas al s-ino Magdaléna Feifíčová kaj s-ro Fritz Lautenbach, la redaktoroj de la bulteno.

Posttagmeze okazis la *Solena fermo* de la kongreso. La LKK-prezidanto Achim Meinel taksis la rezultojn de la kongreso, kaj vokis al la podio la



Transdono de la kongresa flago al la francoj

LKK- membrojn kaj la helpantojn, kaj dankis al ili la faritan laboron. Poste la prezidantino de IFEF Rodica Todor esprimis sian kontenton pri la aranĝo, kaj laŭdis la LKK-membrojn, kiuj kontentige prizorgis ĉion.

Post la adiaŭparoloj la kongresa flago estis malhisata kaj transdonata al la sekvonta kongreslando Francio.

Do ĝis revido en Artigues-pres-Bordeaux en la 65-a IFEF-kongreso en la jaro 2013.

István Gulyás

FAKAJ INFORMOJ

Nova provizada sistemo ĉe MÁV

MÁV instalis novan provizadan metodon, nome elektronikan sistemon. Per tiu la investadaj proceduroj la kostoj fariĝas pli favoraj, la proceduroj plirapidiĝas, atendeble la paper-uzado 85 %-jn, la dediĉita labortempo 30 %-jn malpliĝas. Krome la oferto kaj la akira proceduro plisimpliĝas kaj plirapidiĝas.

Tiu ĉi sistemo subtenas la plenan daŭron de la proceduro de la oferto ĝis la anonco de la rezulto.

*

Ordo en la stacidomo de Budapest-Nyugati

Tribunala ekzekutivo malplenigis 1000 m²-ajn areon de la historiarta konstruaĵo de la stacio Budapest-Nyugati, kiun pluraj entreprenoj senrajte uzis. De pluraj jaroj ili ne havis validan lukontrakton, ĉar per apelacioj ili malhelpis la efektivecojn de la validaj tribunalaj juĝoj.

Rezulte de la malpliigo la nacia fervoja kompanio ekposedis kaj okupis la areojn, per tio komenceblas la rekonstrua laboro de la protektata artobjekta konstruaĵo.

*

Ŝanĝiĝis la horaro de MÁV

Ekde la 13-a de majo ŝanĝiĝis la horaro de MÁV. La ŝanĝo tuŝas kvazaŭ 400 priservadon el

inter la ĝis nun estinta trimil. Sur 49 linioj malpli pasaĝertrajnoj trafikas, inter ili sur la linioj de Esztergom-Almásfüzitő, Székesfehérvár-Komárom, Szombathely-Nagykanizsa, Budapest-Pécs, Budapest-Hatvan-Sátorlajjajújhely kaj Budapest-Cegléd-Szeged.

Dum la prilaboro de la nova horaro, la oferto-malpliigoj, respektive la modifoj estis primara vidpunkto, ke la produkto de la pasaĝertransporto akomodigu al la veturbezonoj, respektive la vojaĝoj estu konvenaj al la laborlokoj kaj lernejoj-lokoj.

*

Monumentprotektada distingo

Pasintjare en originala formo oni rekonstruis la t.n. reĝan atendhalon de la fervojstacio Gödöllő, kiu post la dua mondmilito ruiniĝis pro la manko de ĝia konservado.

La Internacia Konsilantaro de Historiaj Asocioj (ICOMOS) distingas la rekonstruadon de la reĝa atendhalo de Gödöllő; ja ĝi okazis surbaze de scienca esploro, laŭfaka altnivela atrobjekta planado kaj realigo.

La transdono de la honorigo okazis en la Alta Ĉambro de la Parlamentejo dum la publika tago de la Kultura-Jurnalista Komisiono kaj Kultura Heredajprotektata Instituto de la Parlamento.

Cetere la nacia fervojkompanio jam la duan fojon ricevis ICOMOS-premion, ja la ĵurio en 2008 jam aljuĝis tiun honorigon pro la ekzemplovalora monumenta rekonstruo de stacidomo Szeged.

*

Eklaboris la lasta TRAXX-lokomotivo

Enserviĝis la lasta TRAXX-tipa elektra lokomotivo. Ĝi estis la lasta el inter la mendita 25-speca serio, kion MÁV mendis. La serio konsistas el moderna, dukurenta serio, per kio la nacia fervojocieto povas ŝpari 350 milionajn Forintojn da energiokosto.

La dukurenta elektra lokomotivo sen lokomotiv-ŝanĝo ebligas tiri pasaĝer- kaj vartrajnojn trans la landlimo. La TRAXX-lokomotivoj estas pli ŝpareme funkciaj ol la tradiciaj, ja la tiutipaj havas pli intensan rapidkapablon, samtempe kaze de bremsigo renutras la energion al la katenario. La kilometropresto de tiutipaj lokomotivoj estas 22.500 km-j po monato.

*

Sekurecdirektada kaj inspekta centro

Ekfunkciis la sekurecdirekta kaj inspekta centro de MÁV Zrt. Je tiu celo ĝi estiĝis, por ke oni plifirmigu la sekurecon de la ĉefurbaj kaj antaŭurbaj stacioj, ja la fervojkompanio havas 130 milionojn da damaĝo (en 1875 kazoj pro difektigo, ŝtelado), kaj krome 130 milionojn da damaĝo pro kablo-ŝtelado.

Por anticipi tiujn damaĝojn, oni instalas ter-observajn kamerojn en stacioj kaj fervojuzinaj teritorioj.

*

Pli nova ebleco por aĉeti bileton

Ekde majo oni povas egaligi la prezon de fervojaj vojaĝbiletoj (eĉ sidlok-, besto-, biciklobiletoj ktp) ne nur per bankokarto, sed ankaŭ je la konto de la saldo de mobiltelefono. La egaligo povas okazi en ĉiuj tri mobilretoj (nome klientoj de <Telenor>, <T-Mobile> kaj <Vodafone>). Atendeble per tiu ebleco povos mallongiĝi la vicoj antaŭ la bilet-ĝicetoj. Tiuj prezoj egalas kun la prezoj aĉetitaj ĉe la ĝiceto, sed la kliento devas pagi la tarifon de SMS pri la konfirmo. Tiu ĉi sistemo funkcias tage-nokte, do dum 24 horoj de la tago. La transakcio eblas inter la limoj inter 130 kaj 7.500 Forintoj. Oni povas mendi la vojaĝbileton laŭ <www-mav-start.hu> de MÁV-Start. Tiu ĉi nova sistemo ebligas hejman biletpresadon.

*

Nova prezidanto de MÁV

Ekde majo MÁV Zrt havas novan MÁV-prezidanton, S-rino Ilona Dávid estas la prezidantino de la Direktoraro de MÁV.

*

MÁV-Zrt aĉetas „RESTI-Zrt“-n

La entrepreno „RESTI-Zrt“ estas laŭjura posedanto de la iamaj entrepreno „Pasaĝerproviza Entrepreno de MÁV“. Okazis subskribo de kontrakto, ke MÁV Zrt aĉetas 85,58 %-ojn da akcio-parto de RESTI-Zrt; se la Ekonomia

Konkurenco-Instanco aprobas ĝin. La akcio-parto estos MÁV-Zrt posedado kontraŭ 2 miliardoj da Forintoj. Per tiu MÁV-Zrt volas ĉesigi la malzorgitajn, netolereblajn statojn en la stacidomoj.

*

Nova fizionomio en stacio

La kunlaboro de MÁV-Zrt kaj organizaĵo „Kolora Urbo-Movado“ donas novan fizionomion al la muroj de la pasaĝera subpasejo en fervojstacio Budapest-Kelenföld. Antaŭ kelkaj tagoj memvolaj studentoj prenis penikon, kaj plibeligas, laŭpentraĵa sorĉas la 160 m²-ajn areon de la muroj.

*

Etika kodekso

Antaŭ nelonge aperis etika kodekso. Ĝi konceptas kaj samaspektigas la konduktajn regulojn kaj normojn de la fervojaj dungitoj, ĝi peras tiujn valorojn kaj principojn, kiuj montras vojon al etika konduto. La preskriboj de la kodekso grupiĝas ĉirkaŭ fundamentajn principojn, laŭ kio la dungito tiel devas labori kaj konduki, ke per tio konservu, eĉ plifortigu la reputacion de MÁV.

*

UIC jubileas

UIC (Union Internationale des Chemins de Fer – Internacia Fervojunio) fondiĝis en j. 1922 en Parizo. Ĉe la fondiĝo la ĉefa celo, tasko estis unuecigi, normigi la fervojojn, akceli la fervojajn trafikojn inter la unuopaj landoj, laŭ unuecaj kondiĉoj helpi, malfaciligi kaj evoluigi la fervojajn pasager- kaj vartransportojn; la fervojo fariĝu la plej efika kaj la plej populara trafika sistemo. Ekde 2005 okazas grandmezuraj transformiĝoj pro la fervoja liberaligo, kreskanta konkurencon inter diversaj trafikaj manieroj, ekonomiaj premoj kaj aperantaj novaj organizaĵoj.

Nuntempe UIC havas 171 membrojn, inter ili ankaŭ integrigaj fervoja-kompanioj, operatoroj, funkciigantoj de infrastrukturoj, kapacit-distribuantaj organizaĵoj kaj pasaĝertransportaj entreprenoj.

UIC komencis sian 90-jaran jubileon per ekspozicio en sia sideja domo de Parizo. La naciaj fervojkompanioj sendis 1200 altnivelajn fotografajojn, el kio la ĵurio elektis la 300 plej valorajn. Inter tiuj destinitaj bildoj rolas 18 hungaraj fotoj de Katalin Böhm. La ekspoziciaĵo havas kvar kategoriojn: fervojistoj (viroj k. virinoj), kiuj per siaj elstaraj laboroj kontribuis al la historio de la fervojo; antikvaj kaj modernaj lokomotivoj; la amason de protektataj fervoj-konstruaĵoj; kaj la agadon, laboron de UIC, per kiu ĝi kontribuis al la mondnivela evoluo de la fervojo.

*

MÁV-START malkomplikigas la laboron de la konduktoroj

Ekde pluraj jaroj MÁV-Start Zrt klopodas simpligi kaj helpi la administran laboron de la konduktoroj. Tiucele oni komponis taŭgan kaj konvenan aparaton, per kiu la konduktoro povas aranĝi ĉiun dumdeĵoran administran laboron. Ĉiuj veturkoneksaj datoj, raportoj elektronike akiras la centron. Rezulte de tiu ĉi sistemo la bezonataj registradoj, avertoj, inspektado, enspezoj observeblas.

Kompilis **János Patay**

POST LA 14-a IFEF KONGRESO

Dua parto

Malgraŭ la malfacilaĵoj la fakgrupoj havas multajn internaciajn kontaktojn kaj aktivan klubvicon. Multaj fakgrupoj estigis ĝemelajn kontaktojn kun eksterlandaj grupoj, kaj ili reciproke vizitas unu la alian, ili rezulte kunlaboras je prospero. En tiu ĉi rilato elstaras la grupo de Tata, kiu agitis kaj membrigis la urban „Egressy Horo”-n al la fakgrupo, la horo multe rolis en Esperanto-aranĝaĵoj, kongresoj. Same aliĝis la „Belarta Societo”, kiu regule aranĝas altnivelajn ekspoziciojn dise en la lando, eĉ eksterlande. Versajne ĝi estas unusola „Esperantista Belarta Societo” de la mondo!



Dum la landa E-jarkonferenco

Jam delonge ekzistas kontaktoj – kiuj bone servas la komunan agadon, la amikiĝon havigi utilajn konojn – inter la Hungara kaj alilandaj IFEF sekcioj, regule vizitas reciproke unu la aliajn, landajn kongresojn, konferencojn, renkontiĝojn.

Ekzistas ĝemelurbaj kontaktoj, renkontiĝoj, en kiuj havas elstarajn rezultojn la fakgrupo de Tata kun nederlanda kaj germana urboj, kaj la fakgrupo Zalaegerszeg kun slovenaj urboj.

La refondita fakgrupo en Szombathely regule partoprenas en la agado de ALP-ADRIA.

En la rondo de la laboristoj signifa estis la aktiveco de Esperanto-grupoj ĉe la Veturilriparejoj de MAV – ĝis ilia malfunkciiĝo:

En la „Veturilriparejo Dunakeszi” la E-grupo kun la gvido de Lajos Kapitány prezentis elstarajn aktivecojn, kiam ili helpis eklerni esperantajn kantojn al la virhoroj de la Riparejo, por ke ili povu partopreni kaj sukcese roli dum la 14-a IFEF-kongreso;

Bonegajn laborojn faris la E-grupo de la „Veturilriparejo en Miskolc”, kiun gvidis István Pál. Ili organizis multajn lingvokursojn, eldonis lokan esperantlingvan revuon, organizis en- kaj eksterlandajn ekskursojn por la membroj de la E-grupo;

En la „Veturilriparejo Székesfehérvár” la E-grupo sukcese instigis la urban magistraton por nomumi E-placon en la kadro de la Fervojista Amika Renkontiĝo;

La „Veturilriparejo Landler Jenő” en Budapeŝt

helpis al la lokaj esperantistoj, ĉar disponis al ili ejon por kunsidi kaj prezenti ekspoziciojn. La E-grupo sub la gvido de Sándor Kovács partoprenis dum multaj aranĝaĵoj, helpis la preparlaboron, eĉ finance apogis tiujn;

La E-grupo de la „Veturilriparejo Szolnok” ludis gravan rolon en la urba E-movado;

Ankaŭ la esperantistoj de la „Veturilriparejo Északi” en Budapeŝt sukcese agadis en aliaj fervojistaj eĉ nefervojistaj E-organizaĵoj.

La fakgrupo de Miskolc – sub nomo „Miŝkolca Societo de Fervojistaj Esperantistoj” – jam de multaj jaroj ĉiujare organizas karavanajn ekskursojn al diversaj landoj, bone servante la amikecon, interesiĝon kaj sferon de homoj; eĉ propagandon por Esperanto.

La poŝtistaj esperantistoj – ili grupe apartenas al HFEA (Hungara Fervojista Esperanto-Asocio) – kunlaboris por aperiĝi esperantlingvan informtekston de la enlandaj telefon-libroj; plurfoje ili verkis poŝto-fakajn artikolojn por HFM.

HFEA jam de pluraj jaroj havas rezultohavan kunlaboron kun la landa sekcio de FISAIC (Landa Kultura kaj Libertempa Asocio de Fervojistoj – VOKE), nome de tiu la asocio daŭre ricevas multflankan helpon. Sekve de la kunlaboro ni kune rememoris la 50-jaran datrevenon de FISAIC.

HFEA havas rezultoplenan kunlaboran kontakton kun diversaj esperantistaj organizaĵoj; inter ili kun la Hungaria Esperanto-Asocio (HEA), helpante tion, ke ekzistu unueca Esperanto-Movado en nia lando; same kun la „Miŝkolca Societo de Fervojistaj Esperantistoj”. La Landa Asocio havas bonan kontakton, eĉ kunlaboran kontrakton kun Hungaria Esperanto-Asocio (HEA), Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), Mondpaca Esperantista Movado (MEM), Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA).

La movadoj de la asocio helpas la agadon de la „Amika Societo de D-ro Kálmán Kalocsay”, kies celo estas vivteni la memoron de Kalocsay; konigi kaj disvastigi liajn medicinajn kaj literaturajn agadojn; aperiĝi liajn postrestitajn manuskriptojn, helpi interesitojn per informoj, dokumentoj, zorgadi pri liaj memoraĵoj.

La membroj de HFEA regule partoprenas la kongresojn de IFEF kaj UEA, eĉ la najbaraj landoj kaj ĉiam informas la tutan kolegaron pri iliaj kongresaj impresoj, spertoj kaj pri la aktualaj internaciaj movadaj aferoj.



D-ro I. Bácskai malfermas

E-ekspozicion dum la 34-a en IFK en Balatonfüred en 1982

Tiel estas bonkonataj la internaciaj informoj pri la aktualaj de Esperanto-movado.

La reĝimŝanĝo (1989) kreis novan leĝon pri la societoj. Laŭ tiu leĝo ekde la jaro 1996 ankaŭ nia oraniĝo transformiĝis, kaj funkcias laŭleĝe aŭtonoma asocio sub la nomo „Hungara Fervojista Esperanto Asocio” (HFEA) por ke la organizaĵo transvivu la intertempe aperintan ekonomian krizon. Tamen la asocio – kiel sendependa de HEA – kunlaboras kun HEA, eĉ ĝi fiksas la kunlaboron per „Kunlabora kontrakto”. Post la organiza transformiĝo la asocio laboras kun sama entuziasmo kiel antaŭe. Sed bedaŭrinde la nombroj de la asocio malkreskis – same kiel en aliaj landoj – ĉar mankas la junuloj.

La landa organizaĵo tre aktive kaj rezulte partoprenas en la internacia laboro. Tion pruvas la honoro de IFEF, ja ĝi komisiis la hungaran organizaĵon aranĝi la 1995-jaran Kongreson de IFEF.

Post dujara tre preciza preparlaboro inter la 20-a kaj la 26-a de majo 1995 okazis la 47-a Internacia Fervojista Kongreso en la historia urbo Pécs kun 327 partoprenantoj el 23 landoj, kies motoro estis la geedza paro Moró. La membroj de la LKK estis: István Gulyás prezidanto, Moró Alfonz sekretario, Györgyi Moró kasisto, D-ro József Halász fakaj aferoj, Erzsébet Pallós kulturaj programoj kaj ekskursoj, János Patay afergvida sekretario, Éva Miha loĝiga servo. La Kongreson sekvis postkongreso (inter la 27-a kaj la 30-a de majo) en urboj Kecskemét, Budapest, Szentendre, Visegrád.

Originale la organizantoj volis aliroi la 47-an IFK-on al la 1100-jara jubileo de la patrujokupo de la hungaroj en 1996, sed pro la manko de anonco por 1995, HFEA rezignis pri la originala plano kaj entreprenis tiun efektiviĝi en la jaro 1995.

Dum la Kongreso okazis komitatkunsidoj; sep interesaj fakprelegoj. La titolo de la ĉefa fakprelego estis: „La evoluo de la hungara trafiko ĝis la 1100-jara datreveno de la patrujokupado” – fare de D-ro József Halász. La temo estis aktuala en Hungario, eĉ flanke de kongresanoj.

Dum la interesa, atendita programero sub titolo „movadaj aferoj” la partoprenintoj interalie ricevis utilajn informojn pri la lingva aplikado en fakaj aferoj, pri la uzado de komputiloj, propagando de Esperanto. Tiuj estas bone uzablaj



Inaŭguro dum la 52-a IFK



La estraro de IFEF dum la 47-a IFK en Pécs en 1995

dum la sekvontaj agadoj.

En la radiostacio de fervojistaj radioamatoroj grandsukcese kolektis 4000 kontaktojn dise el la mondo. Multaj kongresanoj ĝojis al la filatelaj novaĵoj kaj la porokaza poŝtostampado.

Dum la solena fermo la IFEF-prezidanto konstatis, ke la Kongreso plenumis sian celon, kaj li donis la karesnomon „Kongreso de la komprenemo”!

En jaro 1996 okazis la plej granda doloro por la enlanda kaj internacia movado, ĉar je la 23-an de januaro 1996 mortis la motoro de nia Fervojista Esperanto-Movado – eĉ unu de la tuta Esperanto Movado – D-ro István Bácskai (Oĉjo Piŝta), la fondinto de la postmilita hungara Fervojista Esperanto Movado, la fondinto de la faka revuo Hungara Fervojista Mondo (HFM), kio seninterrompe aperas kvaronjare kun bela eksteraĵo kaj nivela enhavo, kun altnivelaj fakaj, kulturaj movadaj kaj ceteraj artikoloj.

Ni konservas lian memoron. Lastfoje en la j. 2010 en urbo Pécs ni metis marmor-memortabulon sur la monumenton de la esperantistaro, indikante liajn nomon kaj agadon. Nia laboro baziĝas sur liaj ideoj kaj direktivoj, ni klopodas tiel modeste vivi kaj rezulte labori, kiel Li faris.

En la jaro 1997 – krom la hungaraj fervojistaj esperantistoj – multaj legantoj de HFM prirememoris la 40-an jaran datrevenon de la revuo, kaj okaze de tiu jubileo HFEA aranĝis festan jarkunsidon. Okaze de tiu jubileo la vivantaj ses fondintaj membroj ricevis honordiplomon (Béla Anka, József Cziboly, Lajos Csonka, D-ro Imre Ferenczy, D-ro Imre Pethes, D-ro Ferenc Phersy), estis eldonita katalogo de HFM pri ĝiaj 40 jaroj.

La 1998-jara asembleo de HFEA decidis aranĝi IFEF-kongreson en Hungario, pli precize en Budapest kaj konfirmis la membrojn de LKK jene: István Gulyás prezidanto, Mária Balogh kasistino, Alfonz Moró vicprezidanto, János Patay sekretario, D-ro József Halász respondulo pri fakaj aferoj. La asembleo aprobis la preparan laboron de la 52-a IFEF Kongreso, unuanime akceptis la koncernan

laborplanon; firmigis la sloganon de la kongreso: „Eŭropo bezonas fervojon”. La aktivuloj de HFEA, ĉiuj movadanoj klopodis helpi al LKK por la sukceso.

La 21-a jarcento kaj la miljara jubilea jaro de Hungario portis multan interesajon kaj taskon por HFEA kaj ankaŭ por la fervojistaj esperantistoj. Unue la plej grava tasko estis organizi la 52-an IFEF-Kongreson en jaro 2000 en Budapeŝto. En la ĝisnuna historio de IFEF-kongresoj kulminis la landnombro, el kiuj aliĝis el 25 landoj sume 277 esperantistoj. La hejmo de tiu ĉi kongreso estis la eleganta kaj moderna tri-stela Hotel Stadion.



Bácskai memortabulo en la E-parko de Pécs

Tutsemajne funkciis la informejo, librovendejo, certa tage porokaza poŝtoficejo. La plejparto de la kongresanoj loĝis samloke. La ĉefpatrono de la kongreso estis Gábor Bajnai, vicgeneraldirektoro de MÁV, krome patronis ĝin Lajos Abrahám, direktoro de Fervojdirekcio Budapeŝto, Géza Molnár, prezidanto de la hungara sekcio de FISAIC. Dum la kongreso laŭprograme okazis multaj fakaj, oficialaj kunsidoj, diversaj ekskursoj kaj riĉe distraj programoj. La kongreso honoris la membron János Patay per la distingo „Honora Membro de IFEF”. Ĉiuj programoj estis bonsukcesaj. La kongreso ricevis baptonomon „Kongreso de akurateco”.

Dank’ al la senlaca agado de fervojista esperantistaro iom progresis la membronombro de HFEA ĝis la fino de la jaro 1999, inter ili troviĝas ankaŭ junuloj (sub 30 jaraĝo); renoviĝis la fakgrupo en Szombathely.

La fakgrupoj havas utilajn kontaktojn kun la lokaj fevojistoj kaj aliaj stacidomaj deĵorejoj, iliaj estroj, kulturaj, sportaj grupoj, eĉ kun nefervojistaj lokaj esperantistaj grupoj. De jaro al jaro ili aranĝas lingvokursojn, la nombro de la aŭskultantoj varias ĉiujare ĉirkaŭ 100 kursanoj.

Pluraj fakgrupoj propagandcele aperigis flugfoliojn kaj uzis ĉiujn eblecojn ĉe la lokaj gazetoj, televid- kaj radiostacioj. En tiu grava afero elstaras la fakgrupoj de Győr, Kiskunhalas-Kelebia, Zalaegerszeg, Miskolc kaj Tata.

La 2003-jara asembleo de HFEA inter alie traktis la preparlaboron de la 56-a IFEF-Kongreso aranĝota komune kun la aŭstraj gekolegoj (duan fojon du aŭ pluraj landoj en la historio de IFEF) en la hungaria urbo Sopron inter la 8-a kaj la 15-a de majo 2004. La asembleo akceptis la laborplanon de tiu kaj la proponitajn membrojn de LKK, jene: prezidanto István Gulyás (HU), vicprezidanto



Walter Huber salutas la 56-a kongreson de IFEF

Walter Huber (AT), sekretario Alfonz Moró (HU), kasistino Mária Balogh (HU) kaj fakaj programoj D-ro József Halász (HU); krome la sekvaj ĉefkunlaborantoj – laŭ alfabeto de familiaj nomoj – kontribuis al la sukceso: József Cziboly (HU), D-ro Imre Ferenczy (HU), Elisabeth Hlauschek (AT), János Patay (HU), Leopold Patek (AT), D-ro Imre Pethes (HU), Ferenc Phersy (HU), Ernst Quietensky (AT), Franz Scharf (AT), Herbert Sonntag (AT), Martin Stuppig (AT) kaj Friedrich Tschom (AT).

La Kongreso honoris Gábor Pál, la gvidanton de la internacia parto de VOKE (hungarlanda sekcio de FISAIC) per honordiplomo de IFEF pro lia multjara kunlaboro. La raportoj de la landaj sekcioj oni konstatis, ke la averaĝa aĝo de la IFEF-membraro altiĝas, kaj ĉiam pli multe da junuloj mankas el la movado. Inter la distraj programoj kulminis la dulanda nacia vespero kaj ekskurso al la loko de la iama „Paneŭropa Pikniko”, kie en jaro 1989 la hungaroj malfermis la landlimon al okcidento, kaj el la orientaj landoj 10-15 mil personoj – interalie multaj civitanoj de la tiam GDR – libere povis trapaŝi la landlimon al Aŭstrio. La IFEF-estraro kvalifikis la 56-an IFEF-kongreson: „Kongreso de la Amikeco”.

Antaŭ nelonge grandsignifa tasko de HFEA realiĝis kunlabore kun IFEF kaj akceptante ĝian laborplanon: nome la konciza historio de la Hungara Fervojista Esperanto-movado finprepariĝis, kiun je nia honoro la eksprezidanto de IFEF, D-ro Romano Bolognesi reviziis. Espereble akirebla estas la bezonata financaĵo por eldoni ĝin kaj pli-malpli-frue aperos sur la librobreto.

Konante la aktivecon kaj la historion de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio, kiel unu el la vivantaj fondintoj de la organizaĵo, rajte mi povas konstati: Komparante la rezultojn kaj erarojn, problemojn, eĉ la internacia honoro, diversaj altaj distingoj de niaj aktivuloj atestas la sukceson de nia movado.

Mi dankas al miaj ĉiuj kunlaborantoj, al la nendenombrelaj konataj kaj nekonataj samideanoj, kiuj nelacigeble penadis por la sukcesoj!

Honore, estime mi klinas kapon eĉ antaŭ tiuj, kiuj jam ne estas inter ni, ĉar la sorto mallongigis ilian vivon; estas dolore, sed ili forpasis.

D-ro Imre Pethes

ALTA HONORIGO DE GÁBOR PÁL



En la nomo de la ŝtatestro ministro Réthelyi transdonis la distingon al Gábor Pál

Gábor Pál, la direktoro de la Fervoja Muziklernejo ricevis la distingon „Kavalirkruco de la Hungara Ordeno” okazĉe de la nacia festo „1848-jara burĝa revolucio kaj liberecbatalo”. Gábor Pál jam plurfoje estis distingita pri lia rezultohava kultur-laboro: „Wlassics Gyula-premio” (2002), „Ora meritkruco de Hungara Respubliko” (2003), FISAIC-medalo (2004). Li estas konata en la esperantista movado, ja delonge li kunlaboras kun nia fervojista Esperanto-movado, de li direktita Fervoja Muziklernejo prezentis altnivelajn kulturprogramojn dum la 52-a IFEF-kongreso (Budapest), same dum la 56-a IFEF-Kongreso (Sopron). La redakcio de Hungara Fervoja Mondo daŭre prezentas pri liaj laboro kaj rezultoj, lastfoje detale en 2011.

Gábor Pál devenas el fervojista familio. Li komencis sian karieron ĉe la stacidomo Budapest-Keleti (eksploatata servo, etrepren-ekonomisto); finstudis la Oficirklerigan Instituton de MAV, diplomigis en la „Bessenyei György Pedagogia Altlernejo”, same en la filozofia/filologia fakultato de Kossuth Lajos Scienca Universitato de Debrecen.

Li deĵoris en la centro de la Sindikato de Fervojistoj, poste ĉe ĝia reprezentado de Budapeŝta Komitato, fine en 1989 li estis nomumita direktoro de la Centra Kanto-Muzika kaj Belarta Lernejo. Estas interese, ki li estiĝis direktoro de tiu Instituto, en kiu li estis studento de la gitar-fakultato en j. 1960.

Li komencis tiun ĉi fakan laboron pri la restrukturo de la Instituto konvene al la epoko. Li kolektis eminentajn muzik-instruistojn, inter ili d-ron Attila Garay, la eminentan elstaran personecon de la ĵazkant-instruado; krome altkvalitajn instruistojn de gitaro, piano, saksofono kaj klarneto. En 1990 li fondis la „Studion de

Fervoja Muzika Teatraĵo”, kies gvidanto estiĝis la fama artistino Mária Toldy. Pluraj famaj aktoroj – Miklós Szinetár, János Kulka, Tamás Dunai – kunlabore helpis tiun instruadon. Li fondis 30-membran klasikan orkestron, kiu konsistas el studentoj kaj instruistoj. Ilia celo estas porti vivantan muzikon al fervojistaj kulturdomoj, al preĝejoj de vilaĝoj, socialaj hejmoj.

Gábor Pál en 1993 pli profunde ekkonis la laboron kaj mision de FISAIC, kiu entenas 25 membrolandojn, sed tiutempe inter ili la orient-eŭropaj landoj apenaŭ reprezentis sin. Li intense akcelis membriĝi tiujn; poste laŭ tiu penado oni taksis la Muziklernejon kiel la orient-eŭropa centro de FISAIC.

Dum la 1980-aj jaroj la „rock-muziko” (leĝermuzika ĝenro), respektive la „muzika teatraĵo” (sceneja ĝenro, kiu unuigas en si muzikan, dancan kaj teatran elementojn) havis propran teatron, sed la t.n. „rockteatro” baldaŭ mortis; – neniu entreprenis la klerigon de la artistoj de la ĝenro, do estiĝis manko, kion la Studio

celis anstataŭi. En Eŭropo la unuan fojon tiu ĉi skolo prezentis la muzikan teatraĵon „Fame”, nome „Famó” (1996). En j. 2000 la studio kune kun „Vidám Szinpad” (Gaja Podio) prezentis la muzikan teatraĵon „Goodspell”, eĉ post unu jaro la eksterlandaj hungaroj invitis je amerika-kanada turneo por prezenti la „rockoperon” titolitan „István a király” („Stefano la reĝo”).

La Instituto jam pli ol ducent geaktorojn disponigis al la arta mondo; ekzemple Enikő Déttár, Dóra Szinetár, Lilla Polyák, Kata Janza, Réka Koós, Péter Kálloy Molnár, Pál Fekete, Zoltán Bereczki, Sándor Nagy, András Csonka (karesnome Pici – Etulo) kaj Arpád Zsolt Mészáros, ili laŭmerite fariĝis gesteluloj. En la jaro 2000 la Instituto aprobis kunlaboran kontrakton kun la Operet-teatro de Budapest; kaj prenis al si la nomon „Pesti Broadway”. Ekde tiam la studentoj alproprigas la aktorarton kaj dancarton en la Operet-teatro, eĉ ili havas eblon roli en la prezentadoj de tiu teatro. Post trijara instruado tiuj studentoj faras ekzamenon antaŭ la ĵurio de la Aktoro Ĉambro.

Estas granda honoro, ke pluraj instruistoj de la Instituto ricevis altan ŝtatan distingon. D-ro Miklós Réthelyi, ministro – en la societo de du ŝtatestrooj – enmanigis la distingon „Kavalirkruco de la Hungara Ordeno” al Gábor Pál.

La distingito en siaj dankvortoj deklaris, ke tiu distingo apartenas ankaŭ al siaj ĉiuj gekolegoj, ĝeinstruistoj, ja la rezultoj ne estus sukcesintaj sen ilia scio, vivoprofeso kaj nereala persisto.

Okaze de la alta honorigo de Gábor Pál, la hungaraj fervojistaj esperantistoj dankas lian multflankan kulturan kunlaboron, kaj sincere gratulas pro lia merita distingo.

Hungara Fervoja Esperanto-Asocio

ESTRARKUNSIDO DE IFEF EN FRANCO

La printempa estrarkunsido de IFEF okazis inter la 30-a de marto kaj la 4-a de aprilo en la franca urbo Angers, kunligita kun la jara franca fervojista Esperanto-kongreso. Dum la kongreso partoprenis 58 personoj, inter ili ok eksterlandanoj el Belgio, Ĉeĥio, Hungario, Italio, Kubo kaj Rumanio.

Angers estas la ĉefurbo de la departemento „Maine-et-Loire”, kaj historia ĉefurbo de „Anĵuoprovinco”. La urbo havas 156 mil enloĝantojn, ĝi estas la 17-a plej granda urbo en Francio, eĉ kun la ĉirkaŭurboj tie loĝas 283 mil personoj.

En la urbo troveblas multaj malnovaj kaj imponaj konstruaĵoj. La plej grava estas la „Kastelo de Angers”, kiu konstruiĝis en la 13-a jarcento, kaj la Anĵuaj grafoj transformis ĝin al sinjora rezidejo en la 15-a jc. La alia interesa kaj malnova konstruaĵo estas la hospitalo „Sankta Johano”, kaj ĝi funkciis kiel hospitalo dum sep jarcentoj. Fine de la 19-a jc. la hospitalo iĝis arkeologia muzeo, kaj en 1967 ekspoziciejo de la moderna murtapiŝo. Sur la plej alta loko de la urbo staras la katedralo „Sankta Maŭrico”. Angers havas ankoraŭ du malnovajn preĝejojn el la 7-a resp. la 12-a jarcentoj. La urbon



La kastelo „Plessis-Bourre”

ĉirkaŭis kompleksa defendilaro, sur kie nuntempe troviĝas la bulvaroj ĉirkaŭantaj la urbocentron. En la malnova urboparto troveblas ankoraŭ belega teatro, belege flegitaj placoj kaj parkoj, kelkaj faktrabaj domoj, magrandaj kapeloj, zig-zagaj stratetoj kaj aliaj postrestaĵoj.

Dum la kongreso okazis kelkaj tre interesaj ekskursoj al la provinco. La partoprenantoj vizitis la kastelon „de Serrant”, kiu estas la plej okcidenta el la Loire-kasteloj. La kastelo estis konstruita en la 17-a kaj 18-a jarcentoj en du etapoj, tamen la tuto prezentas harmonian arkitekturon. Anglostila parko ĉirkaŭas la kastelon kaj aliajn konstruaĵojn, la kolombejon, la oranĝerion kaj la ĉevalejon. En la kastelaj ĉambroj troviĝas ne nur eksterordinara meblaro el diversaj epokoj, sed ankaŭ artaĵoj, pentraĵoj, tapetoj kaj biblioteko.

La alia ekskurscelo estis la kastelo „Plessis-Bourre”, konstruita en la XV-a jarcento sur loko de eksa monaĥejo. Ĝi estas transira kastelo, unuflanke temas pri kastelo el la fino de la mezepoko kun arkitekturo de defendcela fortikaĵo, kaj aliflanke temas pri plezurrestadejo montranta renesancajn aspektojn. Interne troviĝas multaj murtapiŝoj, pentraĵoj, mebloj, fornoj kaj kamenoj, eĉ ankaŭ kasona plafono pri alĥemistoj en la fama salono de la gardistoj.

Ni vizitis la muzeon „La mine bleue”, kien ni veturis per kablotramo 130 metrojn sub la



Antaŭ la malsupreniro de „Le mine bleue”



Miguel el Kubo fakprelegas

tersurfaco, kaj poste per mino-trajneto ni malkovris la ministan laboron. En la granda subtera kaverno ni vidis filmon pri la vivo de la ministoj. Subtere ĝis 1936 laboris la ministoj, kaj poste pro la ekonomia krizo bankrotis la posedanto, kaj finigis la laboron. De tiam la laboro daŭris nur tersurface ĝis la jaro 1986, kaj de tiam la minejo funkcias kiel muzeo. Tiu vizito rememorigis min al tiu tempo, kiam post la abiturienta ekzameno mi devis labori dum du monatoj en karbminejo en la urbo Pécs. Mi laboris 800 metrojn sub la surfaco, kie estis ege varma temperaturo. Tamen mi devis surhavi vestaĵojn pro karbopolvo, kaj labori fortostreĉe. Tiam mi spertis kaj komprenis, ke mia patro – kiu ankaŭ estis ministro, sed kiam mi laboris en la minejo, li jam iĝis la direktoro de la minejo – kun granda peno povis ebligi mian studadon en la mezlernejo kaj poste en la Universitato.

Okazis vizito ankaŭ en la muzeo kaj uzino de „Cointreau”, kie oni kreas alkoholaĵojn el dolĉaj kaj amaraj oranĝseloj, kaj ni povis gustumi originalan koktelon. La alia vizito okazis en la fungo-kultivejo, kie la nuna posedanto kultivas ĉampinjonojn. Estis interesa vizito al la eksa sarkofago-keleto, la eksa ŝtonminejo kaj en vinkelo en la Layon montetoj.

Inter la kulturaj kaj distraj programoj estis tre interesa la perbilda prezentado de Anĵuo, fare de Jeannine Daguin, la kanzonoj por la Loire-maristaro, kiujn prezentis la grupo „Ellébore”, kaj la unuakta komedio de Raymond Schwartz kun titolo „Verda kato en Montmartre”, fare de Jean Mével.

Okazis du prelegoj. La unuan faris la konata esperantisto André Cherpillod kun la titolo „La mistera arto de la alĥemistoj”. La prelego estis ne nur interesa, sed la preleganto instruis nin al kelkaj nekonataj esprimoj kaj vortoj.

La alian prelegon prezentis Miguel Ángel Gonzáles Alfonso el Kubo. Li estas instruisto, poeto, fervora esperantisto kun multaj Esperanto-postenoj. Li parolis per lumbildoj pri Kubo, ĉefe pri la vivo de la kubanoj, kaj pri la ĉefurbo Havano. Ambaŭ prelegoj estis tre interesaj kaj altnivelaj.

En la kadro de la kongreso okazis ĝenerala kunveno de FFEA, en kies kadro la ĉeestantoj traktis entute 19 tagordoĵojn. Ili taksis la agadon de la Asocio; la sukceson de la lasta IFEF-kongreso, okazinta en Liberec; la antaŭan nacian kongreson, okazinta en Sète; la diversajn staĝojn kaj aliajn okazintaĵojn. La partoprenantoj decidis pri la estontaj farendaĵoj, ĉefe pri la 65-a IFEF-kongreso, kiu okazos en Francio, kaj konstatis, ke la Franca Fervojista Esperanto-Asocio plenumis siajn entreprenitajn taskojn, kaj laboris efike. Fine Jean Ripoché ricevis oran, Jeannine Daguin arĝentan medalon de la Asocio pro la senlaca kaj efika laboro por Esperanto en la kadro de la Franca Fervojista E-Asocio.

Dum la lasta tago okazis la printempa estrarkunsido de IFEF. Partoprenis ĉiuj



La partoprenantoj dum la Franca Fervojista E-Kongreso



Apudlaga domo por estrarkunsido

estraranoj, la ĉefkomitatano kaj membro de la Redaktora Komisiono. Komence partoprenis la kubano Miguel, kiu studis la IFEF-statuton kaj adresaron, kaj li esprimis sian esperon, ke Kubo aliĝos iam al IFEF. En la kadro de la estrarkunsido ni ekzamenis la situacion de la preparlaboro de la 64-a IFEF-kongreso, kaj ni konstatis, ke la preparlaboro – malgraŭ la grava malsano de la prezidanto de LKK – kontinue kaj kontentige daŭras. Grava temo estis la elekto de la ĉefkomitatano kaj la anstataŭanto. La estraro kun ĝojo sciigis, ke la nunaj funkciuloj daŭrigos siajn agadojn, se la komitato reelektos ilin.

La estraro iomete detale traktis pri la eblecoj de la venontaj IFEF-kongresoj. En 2013 la kongreso okazos en Francio, en la urbo Artigues-pres-Bordeaux. La estraranoj studis la provizorajn



En amika rondo ĉe Jeannine



La urba teatro en Angers

aliĝilon, programon, kotizojn, atingeblecojn ktp. Laŭ la proponoj de la estraranoj, la LKK de la 65-a IFK modifos la diversajn kongresajn dokumentojn, kaj en Herzberg ili disdonos tiujn. La prezidantino proponis ekzameni la organizan eblecon por kongresi en 2014 en Hispanio aŭ en Italio, kaj en 2015 en Belgio, Italio aŭ en alia lando, eble ekster Eŭropo. En la kadro de la financaj aferoj la kasisto de IFEF detale konigis la ĝeneralan situacion, kaj la estraro konstatis, ke la financa stabileco estas trankviliga. La estraro provis analizi la situacion en kelkaj landoj, sed la ekzameno estis mankhava, ĉar multaj landaj asocioj ankoraŭ ne sendis jarraporton. Tamen la estraro konstatis, ke

en kelkaj landoj – ĉefe en Serbio, Norvegio, Slovakio kaj Aŭstrio – la agado preskaŭ ĉesis pro la malkresko de la membronombro, pro la manko de gejunuloj, pro la maljuniĝado de la membroj de la landaj asocioj kaj pro la manko de monhelpo. En la kadro de la redakciaj aferoj la redaktoro de IF petis la estraranojn verki artikolojn, sed ne nur de la estraranoj li petis tion, sed de ĉiuj funkciuloj de IFEF, eĉ de la komitatoj kaj de la landaj asocioj de IFEF. La estraro traktis ankoraŭ pri la rilatoj kun UEA kaj FISAIC, eĉ kun aliaj fakaj asocioj, kiel UMEA, ISAE, ILEI.

Post la estrarkunsido la estraranoj faris denove mallongan urborigardon, kaj vespere intiman, komunan vespermanĝon ĉe Jeannine.

István Gulyás

ZOLTÁN KODÁLY

(Kecskemét, 16. 12. 1882. – Budapest, 06. 03. 1967.)


Zoltán Kodály estis muzikscienculo, muzik-profesoro, esploristo de popolmuziko, membro de la Hungara Scienca Akademio. Li naskiĝis la 16-an de decembro 1882. Lia patro estis fervojisto, komence ĉe la komerca fako de la vartransporto en Kecskemét, pli poste staciestro en Szob, Galánta (nun Galanta en Slovakio), fine en Nagyszombat (nun en Trnava en Slovakio). Lia patrino estis filino de polo-devena mastro de restoracio.

Li finis la elementan lernejon en Galánta, la gimnaziajn studojn en Nagyszalonta, kun eminenta kvalifiko li abiturientiĝis en la j. 1900. Poste li estis studento de la hungara-germana fakultato de Pázmány Péter Scienca Universitato en Budapest, kaj tiu de Eötvös Kolegio. Paralele li studis en la komponada fakultato de la tiama Országos Magyar Királyi Zeneakadémia (Landa Hungara Reĝa Muzikakademio). En la koncertoj oni prezentis liajn komponaĵojn (d-minora uverturo [1898], kaj e-bemola trio [1899]). Li akiris komponistan diplomon en 1904. Estas interese, ke post la akiro de tiu diplomo, en la sekva studjaro li refoje enskribiĝis al la Muzikakademio kiel propravola ripetiĝanto.

En 1906 li preparis sian doktoran disertacion pri la strofo-strukturo de la hungara popolkanto. Samtempe li ekkonis la fonogram-kolektaĵon de Béla Vikár; je ĝia konsekvenco li decidis kolekti popolkantojn en provincoj. En la komenco de liaj tiurilataj esploroj li ekkonis la simil-esploriston Béla Bartók kaj ili interamikiĝis. En 1906 sub titolo „Hungaraj popolkantoj” ili kolektive eldonis 10-10 popolkantojn provize kun piano-akompano. Samjare en aŭtuno ili prezentis sian diplomlaboron sub titolo „Somera vespero”. Poste Kodály ekiris studvojaĝon al Berlino kaj

Parizo, kie li ekkonis la muzikon de Claude Debussy. Poste, retiriĝinte al Budapest, li estiĝis profesoro de la Muzikakademio pri la fakultatoj muzik-teorio kaj komponado.

En 1910 Kodály aranĝis sian unuan aŭtoran prezenton al la publiko kun instrumentaj komponaĵoj. Samjare en Budapest li edziniĝis Emma Sándor (Schlesinger), nome la filinon de Maurico Schlesinger kaj Sarolta Deutsch.



Dum la sekva jardeko li komponis nur ĉambromuzikaĵojn, kaj kantojn kun piano- kaj orkestro-akompano. Tiutempe li komponis lian violonoviolonĉelo Sonaton (1914) kaj violonĉelo Sonaton (1915). En siaj homvoĉaj komponaĵoj li ambiciis prefere al la kreo de la hungara kant-kulturo. Ne hazarde li donis la titolon al sia kantoserio „Postrestitaj melodioj”; nome Kodály per la muzikigo de poemoj de János Arany, Sándor Kisfaludy, Dániel Berzsenyi, Ferenc Kölcsey, Mihály Csokonai Vitéz, Bálint Balassa provis substitui tiun kantokulturon, kiuj siatempe ankoraŭ ne ekzistis. Krome ankaŭ la literaturo de la samtempuloj vekis lian

intereson: poemoj de Endre Ady, aŭ kreaĵoj de Béla Balázs, Zsigmond Móricz. La kantoj de Kodály movis antaŭen la estiĝon de la prozodio, konformiĝanta al la inklinoj de la lingvo.

La unua mondmilito malhelpis la disvastiĝon de liaj komponaĵoj kaj ankaŭ la daŭrigon de la provincaj kolektadoj. Tiutempe Kodály verkis sciencpopolarigajn kaj sciencajn komunikaĵojn, kaj aperigis tiujn en muzikaj periodaĵoj „Ethnographia” kaj „Zenei Szemle” (Muzika Revuo). En 1919 oni nomumis lin vicdirektoro de la „Zeneművészeti Főiskola” (Muzikarta Altlernejo – modifita nomo de la Muzikakademio). Inter 1920-1923 li ne

komponis, en 1923 – je la 50-jara jubileo de la unuigo de urboj Pest, Buda kaj Óbuda – dum du monatoj li komponis la oratorion „Psalmus Hungaricus”. Per tiu lia komponaĵo li fariĝis ĉefkomponisto de Hungario. En 1930 oni honoris lin per distingo de „Corvin-krono”.

Kodály komponis muzikon por la teksto de „Hungara Psalmo” de Mihály Kecskeméti Vég.

Dum la 1930-aj jaroj Kodály – kun sia spirita subteno kaj en la signo de sia popoleduka-publikkleriga teorioj – kreis du revuojn „Magyar Kórus” (Hungara Koruso) „Énekszó” (Kantvorto). Ambaŭ revuoj celis la reformigon de la katolika religi-muziko, kaj la levigon de la nivelo de la muzika edukado. Tiutempe liaj pluraj komponaĵoj („Háry János”, „Marosszéki táncok” [Dancoj de Marosszék], „Galántai táncok” [Dancoj de Galánta]) rolis en la repertuaroj de la eŭropaj kaj amerikaj koncertejoj. Du komponaĵoj „Felszállott a páva” (Ekflugis la pavo) kaj „Concerto” naskiĝis je eksterlandaj mendoj; ĉi-lastaj je la 50-jara jubileo de „Filharmonia Orkestro de Ĉikago”. La muzika materialo de komponaĵo „Székely fonó” (Sekula spin-kunveno) baziĝas sole je popolkanto. Kodály resumis popolmuzikan historion sub titolo „A magyar népzene” (La hungara popolmuziko).

Nova temo de la Kodály-verkoj estas la muzika edukado, kiun li rigardis „interna muzik-misio”. Li tenis grava la aferon de la hungara korusa kanto, li sugestis la ideon de antaŭlerneja muzik-instruado. Paralele de tiu li verkis multajn pedagogajn materialojn por lernantoj. Inter la unuaj estas grava verko „Bicinia Hungarica” (ĝia temo estas la enkonduko al la duvoĉa kantado – kvar volumoj, 1937-1942). Sur la kolumnoj de la ĵurnalo „Pesti Napló” li protestis kontraŭ la „judaj leĝoj”. „Petőfi-kórusai” (Ĥoroj de Petőfi: „Batalkanto”, „Filoj de Sklavpatrujo”, „Miraklo de Dio”) fanfaronis la teorion de la hungara kultura kaj nacia sendependeco, eĉ dum la epoko de subprema germana imperio.

Oni nepre devas mencii la t.n. specialan „Kodály-metodon”.

La muziko kaj la kantado estas samtempa kun la homaro. La muziko estas ritma alterno de la silento kaj sono de muzikiloj, kiu kreas emocion al la homo. Dum jarmiloj la muziko evoluis, sanĝiĝis.

Siatempe Kodály ekspertis tiun, kaj prilaboris tiun muzikpedagogan metodon, laŭ kiu jam de sia antaŭlerneja aĝo edukas la homon por konservi kaj evoluigi sian muzikan

kapablon. Tiucele la bazo estas la popolmuziko kaj tiuj kreaĵoj, kiuj estiĝis laŭ la spirito de la popolmuziko. Kodály sciis, ke la homa sono, la komuna kantado povas esti la bazo por ĉiu akirebla muzik-kulturo. Ĝia celo estas la alproprigo de la muziknota skribo-lego, tiun servas la relativa solfeĝado.

En multaj landoj de la mondo oni uzas, utiligas, tiun ĉi Kodály-metodon, ja ĉiu nacio celas konservi siajn valorojn, flegi kaj disvastigi la muzikajn tradiciojn.

Kodály emeritiĝis en 1942, sed en la Muzikakademio li daŭrigis la instruadon de la popolmuzika studobjekto. La Magyar Dalegyesületek Országos Szövetsége (Landa Asocio de la Hugaraj Kantasocioj) nomumis la jaron 1942 „Kodály-év” (Jaro de Kodály).

Dum la lastaj monatoj de la dua mondmilito li enloĝiĝis en la kelon de budapeŝta monaĥinejo. Tie li komponis preĝan meson por paco (orkestro, orgeno kaj koruso) kun titolo „Missa brevis”. Ĝia ĉefurba premiero okazis la 11-an de februaro 1945 en la vestgardejo de la Operejo.

Lia edzino mortis en 1958, post unu jaro li edzinigis sian 19-jaran studentinon.

Post la fino de la dua mondmilito Kodály entreprenis gravan rolon en la spirita rekonstruado de la lando. Li havis multajn publikvivajn taskojn: oni elektis lin prezidanto de la Hungara Arta Konsilantaro kaj tiu de la Libera Organizaĵo de Muzikartistoj; oni nomumis lin prezidanto de direkcia konsilio de la Muzikarta Altlernejo. Post la 1945-jara parlamenta elektado li estiĝis deputito. Inter la jaroj 1946-1949 li estis la prezidanto de la Hungara Scienca Akademio; en 1956 oni elektis lin prezidanto de la Revolucia Konsilantaro de la Hungara Intelektularo.

Zoltán Kodály la 6-an de marto 1967 frumatene mortis en Budapeŝto pro koratako.

Je la iniciato de la karmemora D-ro István Bácskai, la hungaraj fervojistaj esperantistoj rigardas lin „honora fervojisto” – pro la profesio de lia patro.

* * * * *

(Koncerne la komponaĵon „Ekflugis la pavo”, modeste, tamen fiero mi mencias, ke mi estis membro de tiu gimnazia kanthoruso en Kiskunhalas, kiun en 1943 Zoltán Kodály direktis okaze de la nacia festo [la 15-a de marto].)

János Patay

MALSUPREN SUR LA DEKLIVO

Antaŭ unu jaro mortis mia amata edzo, jen estas la tempo por flankenmeti miajn funebrajn vestojn. La gefiloj plenkreskis, fondis propran familion, ili vivas for de la gepatra hejmo, en ilia propra hejmo. Intervenis demando: kiel plu? Antaŭ tri jaroj, post mia emeritiĝo, kun mia edzo ni decidis alproprigi skiadon, sed la morto de la edzo ĝi interrompis. Venis la ideo al mi: revigli la skiadon.

Mi opiniis, estus saĝe, konsilinde refreŝigi mian „ski-sciencan”. Antaŭ la komenco de la trejnado mi kontrolis miajn ski-ekipaĵojn. Plejparte ili bone konserviĝis dum la funebra tempo, sed la skikostumo fariĝis iom malkomforta, ja intertempe mi dikiĝis. Neniu problemo, mi donacos tiun al mia filino kaj antaŭ mia forveturo mi aĉetos novan komfortan, dum la trejnado mi toleros la iom striktan kostumon.

Mi komencis la trejnadon ĉe pli plataj deklivoj ĉe Normafa de la monto Buda. Mia trejnisto komence ne pretendis multon de mi, li proponis kelkajn firmajn trejnadajn kaj poste mi ĉesigu. Sed mi estas obstina, forte mi insistis kaj mi kuraĝis al ĉiam pli krutaj deklivoj. Post iom da tempo mi decidis vojaĝi al Aŭstrio. Mi volas priprovi la grandajn alpajn skitrakojn.

Faro sekvis la ideon. Mi vizitis al turisma agentejo, studis la abundajn ofertojn. Fine mi mendis dektagan ski-ferion en konvena skiparadizo de Tirolo. Antaŭ la forveturo mi aĉetis mirindan kunfasonitan skikostumon, kio havis multajn zipajn poŝojn, ĉe genuo estis remburita, ĉe maleolo malstreĉe faldumita; – kion diri? Belege!!

Alitage mi forveturis. Alveninte mi okupis mian hotelĉambron kaj iom mi ripozis la laciĝojn de la vojaĝo.

Fruvespere – ja mi ne bezonis multajn „vid-atestantojn” – mi aliris al la skitereno de Tubenthal. Mia Dio! Mi, el la strato Népszínház de Budapeŝt, loĝanta en malantaŭa korto, helica ŝtuparo, dua etaĝo, mi Valéria Kovács suĉis grandan enspiron, poste mi ekiris. La unua etapo okazis senprobleme. Antaŭ la kruta deklivo sur eta ripozejo mi ekhaltis por iom spiregi. Eĉ mi devis ne nur spiregi, sed ankaŭ ceteran biologian necesajon fari. Verŝajne mi malvarmumis, ĉar la afero ŝajnis urĝa, jam mi ne estus povinta ĝustatempe reiri al la hotelo; mi ĉirkaŭrigardis,

mi vidis neniun, do mi kaŭriĝis.

Mi ekhavis problemon, mian elegantan skikostumon ne eblis diskroĉi, nur en unu peco mi povis ŝovi malsupren; la puloveron al mia kolo, tiel de ŝultro ĝis maleolo mi montriĝis en mia plena natura beleco. Unuvorte mi kaŭriĝis, kaj – dirante laŭ poeta vorto – „la laboro estis ĝuste en sia plena kulmino”, kiam je mia totala konsterniĝo la skio ekiris sub mi – verŝajne malĝuste mi faris la neĝplugilan pozicion. Komence nur malrapide glitis, poste mi ekrapidiĝis, kaj pere fantomeca rapidego sprintis malsupren sur la kruta deklivo. Mi ne volis rompi al mi la kolon, pro tio mi devis ekstari kaj alpreni la laŭregulan korpopozicion, mia pulovero estis en mia kolo, la kasneto kaj skikostumo sur mia maleolo. Kion diri, jam mi estis en pli feliĉa stato. Senĉese mi ripetadis en mi:

– Mia Dio, se mi transvivas tiun ĉi aferon, mi donacos dekmil forintojn al Sankta Antonio!

Fine mi celis arbuston, la arbusto ne povis flankeniri, mi falis sur ĝin, mi disartikigis mian manartikon, sed per la nevundita mano mi povis suprentiri mian kasneton. La montaj ambulanculoj venis kaj akompanis min al la sukurejo. Tie sur la kanapo oldulo kuŝis kun rompita piedo kaj ruinoj de lia skio. Oni komencis hejti. Dum ni atendis la alvenon de la kuraciŝto, mi komencis konversacii.

– Ĉu ankaŭ vi estas komencanto?

– Ĉu mi, sinjorino? Ekde kvardek jaroj mi skias. Mi estas plurfoja ski-ĉampiono de Aŭstrio, kaj nun mi vundiĝis la unuan fojon.

– Kio okazis al vi?

– Tio estis la infero mem, mia sinjorino. Laŭ mia trankvila ritmo mi glitis malsupren sur la skitrako, kaj de antaŭ mi subite ekaperis sorĉistino, ŝia pulovero estis en sia kolo, la skikostumo sur ŝia maleolo, cetere ŝi estis tute nuda, eĉ la postsigno de ŝia galoperacio estis videbla – ne parolante pri ŝiaj ceteraj virinaj korpopartoj. Kriegante per totala rapideco preterglitis min, tiel mi konsterniĝis, ke mi alglitis dikan arbon. Falu en mian manon tiu sorĉistino!

– Ĉu ankaŭ vi estis ŝia viktimo, sinjorino?

– Mi ankaŭ – mallaŭte mi respondis, kaj cerbumadis pri tio, ke la turisma agentejo kioman sumon deprenus el mia enpago.

Notis: **János Komáromi**



Dum la inaŭguro de la E-placo en Herzberg



La 64-a Kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio kaj la UFE okazos de la 04-a ĝis la 11-a de majo 2013 en Erancio apud Bordojo.
 Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de la Hungara Fervoja Esperanto-Asocio